



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj / Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

JANUARO - FEBRUARO

1965

1

KULTURAJ KAJEROJ

1965

Januaro - Februaro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

La Trian fojon.

Esperanto tra la mondo.

La vivo en Laponio (II) K. Väättänen.

Pri filmoj :

Angoroj (intervjuo).

Gravaj datrevenoj.

Juna vivo centjara.

Richard Strauss Cl. Rostand.
(Trad. J. Dumas).

Kelkaj faktoj pri...

Pollando.

Fantaziaĵo.

Memoraĵo (I) H. Chavar.

Por via distro.

Nia konkurso.

Gramatiko per bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

La Trian Fojon

« Ni, Hamburganoj, kiuj ĉeestis pasintjare periodon en Grésillon, revenos kaj kune kun ni kelkaj aliaj. Por mi mem jam estas la trian fajn. Ĉu tio ne estas la lej boa rekomendo, ke plaĉas al ni la etoso en via kastelo ? »

Tiujn liniojn skribis konata hamburga esperantisto. Ĉu ili ne estas por ni la plej granda kuraĝigo ? Ĉu ili ne estas la pruvo ke ni atingis almenaŭ parton de nia celo ? Ĉar la amikoj, kiuj revenas, ne nur deziras retrovi etoson sed ankaŭ esperas ĝui programon tiel interesan kiel pasintjare. Kaj tio estas ne nur kuraĝigo sed ankaŭ instigo al plua laboro por la respondeculo. Pro tio ankoraŭ ĉijare estis preparita alloga programo.

Ni jam parolis pri la turisma aspekto de la Internaciaj Ferioj (25 julio-8 aŭgusto). Nun, pri la kultura aspekto, ni povas doni detalojn ĉar la programo estas preta. S-ro Vilho Setälä el Finnlando, komitatano de U.E.A. kaj konata verkinto de « Privilegia Vojo » parolos, okaze de la aperigo de la traduko de « Kalevala », pri la « popolpoezio en Finnlando », pri lingvoscienco kaj pri sia lando. Profesoro Duc-Goninaz el Parizo, prezidanto de la Franca Esperanto-Instituto, prezentos prelegojn pri « La dramaturgio de Puŝkin », « La verkaro de Sándor Szathmari (verkinto de « Vojaĝo al Kazohinio » kaj de la ĵus aperinta « Maŝin-mondo ») », « La Sekretaj Sonetoj de

Peter Peneter » kaj pri « Ortografio kaj fonetiko ». S-ino Cheverry, prezidantino de la Esperanto-Grupo en Angers, parolos pri « Hodiaŭa Afriko » kaj « Nobelaj kaj nenobelaj en la franca mezepoka literaturo » ; S-ino Roux, instruistino en Saumur, kaj gvidantino de Supera Kurso de Esperanto en la Kulturdomo, faros serion de prelegoj pri « De la lingvo al la informado ». Plie ni esperas, ke ankaŭ D-ro Bormann, el Germanujo, konsentos prelegi pri ekonomia aŭ socia temo.

Ĉu tia programo ne estas plaĉa ? Seriozaj kaj altvaloraj prelegoj prezentitaj de eminentaj esperantistoj ; agrablaj ekskursoj al multe vizititaj lokoj (kasteloj, zoologia ĝardeno) aŭ al aliaj malpli famaj sed belegaj (malnova urbo en Le Mans kaj muzeo de la aŭtomobilo) ; promenadoj al la ĉirkaŭaĵo de Grésillon (Baugé kaj ĝiaj malnovaj domoj, la dolmeno en la arbareto) ; ripozo sur la herbejoj aŭ sub la arboj de la parko ; sportoj sur la lud-tereno aŭ en la banejo ; vesperaj distraĵoj en la salonoj. Kaj ĉio, seriozaj kaj distraĵoj, baniĝanta en la plej amika etoso, kiu ekster la programo, ebligas novajn amikiĝojn kaj interesajn konversaciojn.

Tion prezentas al la tuta esperantistaro la Kulturdomo. La proponitaj aktivaj ŝajnas sufiĉe diversaj, por ke ĉiu trovu kontentigon, por ke, ankoraŭ ĉijare, multaj francoj kaj eksterlandanoj vizitu Grézillon, la unuan fojon aŭ... la trian.

Ni dankas la multajn amikojn, kiuj skribas por diri kiom multe « **KULTURAJ KAJEROJ** » plaĉas al ili. Ni ne povas respondi al ĉiuj. Sed ni opinias, ke la plej trafa danko al ili estos nia plua laboro por regule alporti al la legantoj en pli ol tridek landoj, agrablan, facile legeblan revuon.

Esperanto tra la Mondo



KONGRESOJ EN 1965

La 2-a Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata okazos en Britujo de la 13-a ĝis la 20-a de Aŭgusto. Informoj : S-ro R.H.M. Markarian, 2 Hazel Grove, Chorley, Lancs.

38-a Kongreso de SAT en Karlsruhe (Germanujo), de la 31-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto. Adreso : S-ro W. Bandel, 75 Karlsruhe, Marienstr. 88.

Pluraj karavanoj organiziĝas por iri al Tokio. Informoj ĉe : UEA, franca, germana kaj itala Esperanto-Asocioj.

La Eŭropa Esperanto-Konferenco de Vieno prepariĝas. Petu informojn al via nacia asocio aŭ rekte al la Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausegasse 16, Wien.

La Franca Nacia Kongreso okazos en Le Havre de la 5-a ĝis 7-a de Junio. Adreso : Esperanto Kongreso, 33, rue StMichel, Le Havre.

La Kulturaj kaj Turismaj Internaciaj Ferioj en Gresillon bone anonciĝas kun partopreno de elstaraj esperantistoj. Vizito de Parizo antaŭvidita. Tuj petu informojn : Esperantista Kulturdomo, Baugé (M.-et-L.), Francujo.

Okaze de la Universala Kongreso en Tokio okazos granda foto-konkurso en kunlaboro kun la japana firmo de foto-materialo Fujio. Belegaj premioj. Temo : « Virino ».

LA TUTMONDA PETICIO

La subskribo-peticio favore al esperanto tre bone ekmarŝas. Ĉu vi subskribigis la oficialulon kiujn vi konas kaj viajn amikojn ? Tuj petu foliojn al via landa Asocio.

EN LA MONDO

Mongolio. — En Mongolio eldoniĝis 3.000 ekzempleroj de aŭtodidakta lernolibro de esperanto, kompilita de Pr. Dro Rinĉen membro de la Scienca Akademio en Ulan Bator.

Kongo. — Kreiĝis Konga Esperanto-Instituto en Leopoldville. Adreso : B.P. 7579, Leopoldville 1. Jam okazis kursoj kaj aperas multobligit gazeto : « Afrika Revuo ». Bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj.

Koreujo. — En Suda Koreujo okazas energia agado por esperanto. Multaj komencantoj bezonas korespondantojn. Adreso : S-ro Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, Seoul.

Cirkaŭ 120 gestudentoj ĉeestis kursojn en Pjengjang, Norda Koreujo. Aperis nova vortaro esperanta-korea.

LIBROJ

Jus aperis en la serio « Oriento-Okcidento » : « Kalevala », la granda nacia eposo de la finnoj, verse tradukita kun postprezentado, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Belega prezentado ; 368 p. (Havabla ĉe nia Libro-Servo).

« Raciaj derivoj kaj verbuzo », aldonajo al ĉiuj nunaj vortaroj kaj lernolibroj de Emilo Gasse. — 2,20 st. — Ĉe la aŭtoro : Bloc B., place Th.-Lefèvre, 83, Hyères.

DIVERSAĴOJ

Utila broŝuro por la francaj grupoj estas ĵus eldonita de UFE, 34, rue de Chabrol, Parizo (10). Tre utila por la gvidantoj kaj agemuloj de la lokaj societoj. Franclingva. Prezo : 2,50 Fr.

Luksa komerca reklamilo en Esperanto eldonita de la firmo Fiat (Torino, Italujo). Lukse ilustrita faldfolio pri la aŭtomobilo Fiat 850. Skribu esperantlingve por peti kvanteton de tiu senpaga faldfolio por viaj grupanoj.

La germana federacia fervojo eldonis, depost 1953, preskaŭ 4 milionojn da horaroj kun tekstoj en internacia lingvo.

FAKOJ

Aŭtomobilistoj. — La nova Internacia E. Klubo Aŭtomobilista (IEKA) ekfunkcias. Adreso : S-ro Jaumotte, De Bruynlan 44, Wilrijk (Antwerpen). Belgujo. Ĝi preparas aŭtomobilan karavanon por iri al Vieno.

UEA kreas specialan fakdelegitan kategorion « SOS-Aŭto-Servo » por membroj, kiuj pretas interpreti inter paneotrafitoj kaj riparistoj.

Agrikulturo. — Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj (ILASE) komencis eldoni multobligitan revuon, « Agrikultura Bulteno ». Informoj : S-ro S. Kukuŝev, ul. Oboriŝte 15, Peŝtera, Bulgario.

Radio-amatoroj. — La revuo « Homo kaj Kosmo » publikigas en ĉiu numero informojn pri la esperanto-radioamatoroj. Se tiu fako interesas vin, kontaktu S-ran Edward Lindberg, Bowmansville, N.Y., Usono. Samtempe, se vi estas radioamatoro, sendu vian adreson kaj voksignon al la revuo « Homo kaj Kosmo », Astronomia Observatorio, Zagreb, poŝtfako 165, Jugoslavio. Petu ekzempleron de la revuo se vi ne konas ĝin.

El ie en la mondo

La vivo en Laponio de Finnlando

(II)

La plej malnovaj viviloj en la nordaj teritorioj estas ĉasado kaj fiŝkaptado. Per tiuj vivis la unuaj enloĝantoj kaj la kolonioj vastiĝis. Kelkaj



Laponio mastrumas en sia tendo

gravaj ĉasaĵoj jam de longe ekstermiĝis. Pro katenigo de akvofaloj ankaŭ la salmoj de Kemirivero ŝajnas esti ĉe limo de finiĝo. La plej gravaj ĉasaĵoj nuntempe estas, krom pisamo (germanlingve die Bisamratte), ankaŭ alko, sciuro kaj ia birdoj. Unu el la plej malnovaj viviloj en Laponio estas boacbredado, per kiu multaj enloĝantoj de la Arbar-Laponio eĉ ankoraŭ nuntempe okupiĝas.

Profiteblecon de terkulturo en Laponio oni suspektas, ĉar kutime la tero estas neĝkovrita ekde la mezo de oktobro ĝis la fino de majo ;

aŭ eĉ ĝis la komenciĝo de Junio. Ofte neĝas en junio. Ĉirkaŭ 23 tagnoktojn po jare la suno estas tute nevidebla en la mezo de Laponio, kaj dum 53 tagnoktoj ĝi ne subiras. La heleco de somero nur iom kompensas la malhelecon kaj mankantan varmon de la vintro. La terkulturo en Arbar-Laponio direktiĝas antaŭ ĉio al marĉoj, kiuj en la teritorio estas multaj, kaj kiujn oni kredas entenantaj abunde da riĉaĵoj. La plej grava vivilo en la nordo nuntempe estas arbarekonomio. Kvankam la tero enhavas malmulte da flava oro, ĝi estas riĉa je la tiel nomita « verda oro ».

Kaŭze de arbarlaboro, la vivo en Laponio dum la lastaj jardekoj fariĝis pli vigla. Kie troviĝas arbarlaborejo, tie cirkulas mono, kaj parto el ĝi restas por la utilo de la lokaj loĝantoj. La trunkistoj de la nordo estas bravaj kaj senzorgaj. Multaj el ili loĝis konstante en la dezertoj de Laponio.

Se preterveturanto haltas ĉe iu domo kaj interesiĝas pri la vivo de la enloĝantoj, li kutime aŭdas de la mastro la jenan rakonton : la mastro naskiĝis ie en la sudo. Kiel junulo li ekiris norden por serĉi trunklaboron. Juneco pasis. Preterpasinte li vidis tiun ĉi belan lokon, kiu tre plaĉis al li, kaj li enloĝiĝis. Tiam ne ekzistis ŝoseoj : oni promenis laŭ vojetoj. Mangajsakon li ĵetis sur branĉon de arbo kaj li trovis dormejon sub la arbo. Kaj tuj komenciĝis la konstruado de la domo. Poste sarkado de la kampoj. Kiam la domo estis preta li fondis familion. Ĉe trunklaboroj li ankoraŭ perlaboras vintre. »

Tiamaniere plejparte estiĝis la kolonioj de Laponio. « Laponio estas bela », oni diras. Pro tio multaj sudfinnoj deiris de pli varmaj sudaj regionoj kaj migris al pli trankvilaj, malpli loĝataj lokoj, norden. Ĉe printempo oni revenas hejmen de vintraj laborejoj. Oni prisemas la kampojn. Antaŭe la homoj ne disponis pri aliaj laboriloj ol pioĉoj, fosiloj kaj hakiloj. La kampoj situis je distanco de mejloj. Frosto ofte rikoltis la grenon. Tiam la ŝtato ne helpis. Oni devis fidi al propra forto kaj helpo de Dio. Estas pasintaj jardekoj. Ŝoseoj estas konstruitaj kaj laŭ ili venis novaj kutimoj, novaj vivrimedoj kaj ankaŭ la detruo de la milito. Novaj najbaroj priloĝis la regionon. La kampoj nun estas pli larĝaj kaj la domoj pli grandaj. Tion rakontis unu el tiuj, kiuj sarkis dezertojn de Finnlando por loĝado : mal-

junujo en kies rigardo briletas la paco de la laborinto.

En grandaj loĝdensejoj, kiel Kemijarvi, Sal-la, Pelkosenniemi, Sodankyla kaj Kittilä, Laponio aspektas sama kiel en Rovaniemi. Tiuj regionoj diferencas de Rovaniemi nur per tio ke oni vidas ĉion kvazaŭ en miniatura formo kaj ankoraŭ fiksita je tradiciaj kutimoj. Kolonioj de Laponoj loĝas dise, plej multe en Petsamo, Inari kaj Ivallo. Sed ankoraŭ en tiuj regionoj estas invadintaj finnaj kolonioj : ĉie, en loĝeblaj kaj malloĝeblaj lokoj, kie ekzistas apenaŭ eblecoj de memstara vivo. Eĉ Uutsriveron, kiu ĝis la lasta milito estis pura lapona komunumo, invadis finnoj, kvazaŭ en Finnlando regus spaco-manko. Kiel klarigon de tiu invado oni menciis krom ia « Laponio-mal-sano », la bonajn laboreblecojn devenajn de urĝaj postmilitaj rekonstruadoj.

Enontekiö, la Altmonto-Laponio estas la angulo de la lando, kie la vivo de la laponoj ĝis nun konserviĝis en sia originala formo. Ankoraŭ nuntempe troviĝas en tiu regiono familioj, kiuj vintre loĝas en laponaj tendoj, sed somere nur de tempo al tempo en ili. Sendube la sudlandanoj supozus la malon. Tiu kutimo devenas de tio, ke la vivo de boacbredistoj tute dependas de la vivkulturoj de la boacoj. Ĝis lastaj tempoj la boaco estis la « kampo » de la lapono. Kaj ankoraŭ nuntempe li ricevas sian ĉefan nutraĵon, vianĉon kaj materialon por siaj ŝuoj kaj vestoj el la boacoj. Per la mono, ricevita de la vendo de la boacproduktaĵoj, li aĉetas siajn aliajn bezonaĵojn.

Ĉie en nuntempa Inari aperas la progreso de la tekniko, kiu lasas ne-nion netuŝita ? Ĉi eĉ ne ŝparis la « koro » de la regiono, la lagon Inari, kiun la laponoj nomas : « la lago de trimiloj da insuloj ». Post la detruo komenciĝis la entrepreno nomita « Forto de Nordo », katenigo de Kemi-rivero, per konstruo apud la urbo

Kemi de dinamite nomita « Isohaara ». Poste unuiĝis al la laboro la entrepreno « Forto de Imatra », kiu kun pli poste fondita akcia societo « Kemi-rivero » komencis la konstruadon de la dinamite « Petâjâkoski » (Pino-rapidfluo).

Dum la jardeko unu post la alia fondiĝis novaj, grandaj kaj pli malgrandaj entreprenoj, kiuj provis devigi la montaron malfermi siajn kavaĵojn por trezor-serĉistoj. Sed plej parte trompiĝis la serĉistoj kaj eĉ grandaj kapitaloj elspeziĝis senprofite. Tamen novajn enloĝantojn el la sudo tiuj provoj venigis norden, eĉ ĝis malnova Inari ; ia novvalvenantoj iom post iom fortigis la finnan loĝantaron je malprofito de la originaj loĝantoj, la laponoj.

(Daŭrigota).

S-ino Kerttu Vaatanen.



La altmonto « Saana » ĉe Kilpisjärvi

« KULTURAJ KAJEROJ » INTERESAS VIN ?

NE FORGESU ABONI KAJ

ABONIGI VIAJN AMIKOJN

Adreso :

« Kulturaj Kajeroj »

H. Micard, **Epineux-le-Séguin**, Mayenne, Francujo

aŭ : la peranto en via lando

(vidu liston sur la lasto kovrilpaĝo)



Pri esperantlingvaj filmoj ĝenerale kaj speciale, pri

ANGOROJ

(kelkaj minutoj kun S-ro Micard,
prezidanto de la esperantista Kulturdomo,
kaj S-ro J.L. Mahé)

Intervjuanto. — S-ro Prezidanto, mi konstatis, ke la filmoj okupas grandan lokon en la diversaj aktivaj en la Kulturdomo.

H. Micard. — Jes, fakte, ni konsideras, ke filmo estas edukiga (kiam taŭge elektita) ĝenerale, sed ankaŭ tre bona instruilo de Esperanto. Oni lernas lingvon ne nur, aktive, per la buŝo, sed ankaŭ, pasive, per la orelo. Tiamaniere fiksigas vortoj, frazeroj, kiuj, klarigitaj de la bildoj, pli facile lokiĝas en la individua vorttezoro de ĉiu aŭdanto.

Intervjuanto. — Sed, kiamaniere vi povas havigi al vi tiujn filmojn?

H. Micard. — Ni aĉetas franclingvajn filmojn kaj esperantigas ilin. Ni devas reverki la komenton. Ĉar ni jam esperantigis dekon da filmoj ni atingas nun bonan rezulton. Sed la laboro, ĉefe koncerne la teknikon estas iom delikata. Elektroniko estas tiom misterplena! La idealo estus originalaj esperantlingvaj filmoj. Sed ŝajnas, ke la esperantistoj ne interesiĝas pri tio.

Intervjuanto. — Mi supozas, ke via lasta frazo rilatas al la filmo de J.L. Mahé: « ANGOROJ »?

H. Micard. — Jes, vi pravus. Ni aĉetis kopion de tiu filmo kaj ĝin prezentis jam al centoj da esperantistoj.

Intervjuanto. — Kiel ili akceptis ĝin?

H. Micard. — Diversmaniere sed ĝenerale favore. La vidpunktoj kaj kompreneble la opinioj estas diversaj. Oni plej ofte riproĉas al la filmo kelkajn mallertajn scenojn la enscenigon; la tro « teatran » prononcon de la aktoroj; kelkajn, tre malmultajn, teknikajn mankojn (sed ĉu oni povas, nur post unu video, « malkovri » teknikajn mankojn de filmoj jam multfoje observita de specialistoj?). Kelkaj ankaŭ opinias, ke la temo ne konvenas al esperantista medio.

Intervjuanto. — Jes, Mahé, kial vi ne dediĉis tiom da laboro preferinde al propaganda filmo?

J.L. Mahé. — Ĉar tiun sperton mi jam faris sensukcese. En 1937. Ĝi titoliĝis « ANTAŬEN ». Ĝi estis prezen-

tata dum Internacia Kongreso, kaj ricevis sufiĉan reklamon. Tamen, krom Francujo, neniu iam aŭ ie ajn uzis ĝin. Do, ĉar tiu temo pruviĝis ne sufiĉe loga, necesis provi alian.

Intervjuanto. — Eble. Sed pri la aspekto de « Angoroj », mi ŝatus havi vian personan opinion, S-ro Micard, t.e. la opinion de iu, kiu « praktikis » la filmon, ĝin plurfoje prezentis al la publiko.

H. Micard. — Mia opinio? Se mi komparas la filmon de Mahé kun aliaj nacilingvaj filmoj, mi diros, ke ĝi ne entenas multe pli da mallertaj ol multe el tiuj, kiuj kelkfoje altiras la homojn en kinejojn. Tion mi povas aserti ĉar, de multaj jaroj, mi prezentas filmojn ĉiusemajne al la legantoj de mia vilaĝo kaj de du aliaj vilaĝoj. Due, la temo de « ANGOROJ » ĝenerale pli plaĉas ol la « rozakvaj », « senkoloraj » filmoj kuintime, malĝuste, nomitaj « popularaj ». Mi eĉ diros,



Kelkaj teknikistoj kaj rolantoj : de maldekstre dekstren : Iana Ravselj, J. Petit, S. Flego, J. Thierry, J.-L. Mahé.
(Kliŝo : Heroldo).

ke, feliĉe, iu ajn temo konvenas al la esperantistoj, ĉar la esperantistoj estas maturaj homoj kaj sufiĉe diversaj. Ili antaŭenigos esperanton nur puŝante ĝin ekster la pure esperantista medio. Esperanto helpas la homojn interkompreniĝi. Jes! Sed pri kio? Ĉu nur pri esperantistaj aferoj? La esperantista mondo ne devas esti nur la esperantista medio sed la tuta mondo. Kaj la mondo estas la sumo de

ĉiuj interesajoj, parto el kiuj estas ankaŭ detektivromanoj kaj la « etoso-filmoj ». Mahé, certe vi ne kontraŭdiros min ?

J.L. Mahé. — Kompreneble. Despli amuze, ke mi ĵus aŭdis jenajn rimarkojn koncerne miajn novelojn en « Monda Kulturo » : « Ĉu do vi ne povas uzi Esperanton por aliaj temoj ol Esperantaj aŭ Esperantistaj ? Vi kredigas, ke nia lingvo estas rezervita al niaj internaj baraktoj... » Nu, « ANGOROJ » ĝuste venis por atesti la malon. Kaj kial mi ne elektis « rozkolaran » temon ? Ĉar distri samideanojn dum unu horo, tion mi konsideris, kiel flankan celon. Ĉefe estas demonstri al eksteruloj, ke Esperanto validas por ĉiuj temoj en ĉiuj medioj : do, interesi maksimuman publikon. La statistikoj montras, ke la plej vizitataj kinajoj estas la gangsteraj. Post la erotikaj. Tial, mi unue pensis pri erotika filmo, sed la adapto al multaj diversregulaj cenzuroj levis malfacilajn problemojn. Do, mi devis rezigniĉi al bandita dramo.

Intervjuanto. — Hum ! Vi eble pravas. Sed ĉu la prononco de la aktoroj ne donas al la aŭskultanto impreson pri « artefariteco » ?

H. Micard. — Jen kuŝas la ĉefa afero, mi opinias. La unua parto, prezentado de la pulbazaroj, fare de Prof. Warighien estas tre bona. Ĝi ŝajnas tro longa, ne per si mem, sed rilate al la filmo.

J.L. Mahé. — Verdire, mi konsentas, ke ĝi estas iom longa. Kaj mi certe ne estus prezentita ĝin tia al publiko nur franca. Sed, ĉar tiu pulbazaroj estas tre pitoreska, mi ne rezistis la okazon montri ĝin iel detale al la monda publiko.

Intervjuanto. — Sed, kiel diris Micard, ĝi estas tre bona. Sed la rolantoj poste forgesas, ke ili ne estas sur scenejo sed antaŭ kamero. Ili iom tro bone prononcas. Kompreneble ili tion faris por ke ĉiuj aŭskultantoj, eĉ la ne tre lertaj esperantistoj bone komprenu ilin...

J.L. Mahé. — Jen vi trafas tiklan punkton. Ni devis elekti el du kondutoj. Sed, mi sciigos al vi, ke en Gressillon mem, oni iam bedaŭris, ke la aktoroj tro rapide parolas, kaj ke plej multaj ĉeestantoj ne komprenas. Aliflanke ni nenion troigis : fakte oni iom hiptnotigas pri la franca akcento de Marc Darnault, kiu validas por lia persono. Sed ne ŝajnas al mi, ke Flego kaj Ravselj parolas kvazaŭ pedagogie.

H. Micard. — Ne eskapiĝu el la faktoj ! La dialogoj estas ja malrapida. Prave laŭ vidpunkto de efiko, sed erare laŭ kino-arto.

Intervjuanto. — Tamen, konklude, Micard, vi opinias, ke « ANGOROJ » meritas la interesigon de la esperantistoj ?

H. Micard. — Mi eĉ diros, ke la esperantistoj devas nepre interesiĝi pri ĝi. Ĝi renkontas la interesigon de la pli multo el la spektantoj. Mi diris antaŭ momento, ke la esperantistoj ne ŝajnas interesiĝi pri ĝi nur pro tio, ke la organizaĵoj ne montras grandan deziron ĝin ekspluati.

Intervjuanto. — Sed ĉu la respondeculoj de la naciaj kaj internaciaj movadoj havis la okazon ĝin vidi ?

J.L. Mahé. — Kompreneble. Okaze de la prezentaĵoj en Narbonne, New-York kaj Den Haag.

Intervjuanto. — Tio estas bona reklamo.

H. Micard. — Jes. Sed oni forgesas, ke la kopio tiuokaze prezentita estas propraĵo de la farintoj. Ĉar tio estas grava punkto. Kelkaj gesamideanoj kunigis por fari filmojn, la solan nun prezenteban originalan esperantlingvan filmojn. Tiu aro de bonvolemluloj elspezis multan monon. Ili dediĉis al sia laboro multe da tempo...

J.L. Mahé. — Dekok monatojn por la sola filmado !

H. Micard. — Kiucele ? Por disponigi al la esperantistaro novaĵojn : esperantlingvan filmojn. Ili ne deziras profiton, nur komprenemon kaj solidarecon. Ili nur deziras renspezi la elspezitan sumon por eventuale fari alian filmojn verŝajne aliaspektan, pro tio ke sperto kaj kritikoj estas fruktodonaĵoj kaj obligas evoluon de la metodoj.

Intervjuanto. — Sed estas kompreneble, ke oni hezitas doni monojn por io diskutebla.

H. Micard. — Tio estas komprenebla de homoj, kiuj pensas, ke monon oni elspezas nur cele al profito aŭ plena ĝuo. Sed ni estas inter esperantistoj, kaj oni diras ke la esperantistoj ne estas tiaj homoj. Kiajn sumojn la esperantistaro elspezas nur por la idealo, por helpi tiun aŭ tiun ĝi kampanjon, sen persona profito, nur por ke la movado antaŭeniru. Oni miras kaj aplaŭdas, kiam aperas nova libro, nova revuo. Sed oni eĉ ne helpas la iniciatintojn, la pionirojn de la esperanta film-arto.

Intervjuanto. — Fakte, tio ŝajnas stranga, ne facile komprenebla. Sed, kiu estas la kialo de tia neinteresiĝo ?

H. Micard. — Laŭ mi, la esperantistoj kaj ĉefe la respondeculoj ne konscias ke la naskiĝo de tiu filmo estas granda evento, simila je la apero de la unua esperantlingva originale verkita libro. Se neniu estus aĉetinta la unuan libron aŭ aboninta la unuan revuon ne ekzistus la esperanta literaturo pri kiu ne tute ĝuste kaj piave fieras. Plej ofte ili estus pretaj prezenti la filmojn al la grupoj sed ili ne volas pagi por tio, ne pensante, ke Nacia Asocio luiganta la kopion al la grupoj povus renspezi almenaŭ parton de la elspezo. Ili pensas kiel aferistoj ne kiel esperantistoj. Ili ne konscias, ke ili preterpasas grandan ŝancon : ke se la aŭtoroj de la filmo ne renspezas la elspezitan sumon ili ne povos fari alian filmojn ; ke dum verŝajne longaj jaroj oni ne faros alian tian filmojn ; ke oni neniam povas plaĉi al ĉiuj ; ke ĉiu valora iniciatinto devas esti kuraĝigita por ebligati aliajn atingojojn.

Intervjuanto. — Fakte temas pri speco de investado ?

H. Micard. — Jes pri vera investado. Oni unue elspezu monon kaj tempon por pli poste « enspezi » sukceson. Se la internaciaj kaj naciaj instancoj bonvolos helpi la Mahé-on ili post kelkaj jaroj, eble, povos fieri pri alia filmo, kiun ĉiuj nomos « nia » filmo. Kaj tiu filmo preparandos esperanton ekster la esperantista menĉio. Tio estas ebla nur per iom da mono elspezita de la unuaj kaj granda sindonemo, jam evidentigita, de la aliaj.

Intervjuanto. — Do, via konkludo estas... ?

H. Micard. — Mi estas malnova esperantisto. Mi travivis sukcesojn kaj malsukcesojn. Miaj spertoj montras, ke tiujn malsukcesojn oni ŝuldas al manko de konscio je la taŭga momento. Mi esperas, ke nun, la esperantistoj scios kapti la preterpasantan ŝancon.


GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis en Svedujo.

Sven HEDIN. — La sveda esploristo komencis vojaĝi kaj esplori en 1886. En popularsciencaj libroj li rakontis siajn vojaĝojn en Centra Azio, ĉefe en Tibeto, kiun, ofte la unua, li vizitis okaze de pluraj ekspedicioj. Li faris vojaĝon ĉirkaŭ la mondo en 1923. Ĝis 1935 li esploris la Gobi-dezerton kaj la ĉinan Turkestanon kun internacia grupo de scienculoj. Hedin ludis gravan rolon en la esplorado de Centra Azio.



Antaŭ 100 jaroj naskiĝis en Francujo

Henri DE TOULOUSE LAUTREC. — La pentristo naskiĝis en nobela franca familio. Li kripliĝis pro akcidento. Post studoj en la Pariza Akademio li vivis, de post 1886, en Montmartre. Li pruntis la temojn de siaj pentrojoj al la « mondo » de la kafejoj, de la kabaretoj, de la cirkoj kaj de la ĉeval-kurejoj. Lia persona arto kuŝas ne nur en la koloro sed ankaŭ en la linioj. Preskaŭ ĉiuj liaj figuroj estas karikaturoj sed spritaj. Liaj produktadoj aspektigas pli amikaj la kruelon kaj la timigon de la mondo.



Antaŭ 20 jaroj mortis en Francujo.

Romain ROLLAND. — La franca verkisto estis dum naŭ jaroj profesoro pri Muzikhistorio en Parizo. Li komencis sian karieron per biografioj de muzikistoj. Li estis idealisto kaj pensis, ke oni povas alproksimigi la popolojn per la kulturo kaj la arto. Li senlace batalis favore al franca-germana akordo. En 1915, Romain Rolland ricevis la Nobel-premion pri Literaturo pro sia romano « Jean Christophe ». Li vizitis Hinduojn por verki biografion de Gandhi.

JUNA VIRO CENTJARA

Richard Strauss

La operdomoj, kaj la simfoniaj societoj el la tuta mondo festas, tiujare, la jarcentan datrevenon de R. Strauss, kiu mortis en 1949 kaj apartenis al ia mondo hodiaŭ transpaŝita, sed kies verkaro konservas, hodiaŭ, eksterordinaran Junecon.

Tiu Juneco ŝajnas neŝangebla, ĉar Strauss estas unu el la malmultaj muzikistoj kiuj, post sia morto, ne falos en la forgesiga purgatorio en kion falis Bach, Rameau, kaj kelkaj aliaj altrangaj majstroj. Strauss, rekte, eniris historion kaj eternecon. Ni devas esti feliĉaj, ĉar ni ŝuldas al li grandajn ĝojojn kiuj ŝajnas neŝangeblaj : meze de Eŭropo, periode superŝutata de plej nigraj nuboj, kaj sur kiu falis kelkaj ruinigaj fulmotondroj, R. Strauss ĉiam elmontris serenecon por nin amuzi aŭ nin kortuŝi. Sufiĉa estas nun la malproksimiĝo por ke ni provu ekkonscii kian rolon li ludis en la evoluado de la muziko.

Je la krepusko de la romantika epoko, kune kun li, ni eniras mondon, samtempe modernan kaj klasikan, kie, malofte merito dum tiu epoko, li scias eviti la post-Wagneran senelirejon. Tiu Bavarulo, vivanta dum du sinsekvaj epokoj, montras nek la timeton, nek la maltrankvilon de siaj samtempoj, de Gustav Mahler, speciale. Li apartenas al tiu fortika kaj benplena generacio germana al kiu la juna Imperio donas neskueblan memfidon. Li estas unu el la plej kompletaj heredantoj de la muzika germana komuna havo. Lia stilo estas plej tipa ekzemplo de baroka stilo. Li similas Jongliston : kvankam li senzorge uzas plej vertigan kontrapunkton, aŭ omaĝas al Mozart, Liszt, Berlioz, Wagner aŭ al Johann Strauss, neniam estas eble serioze paroli pri « influoj », ĉar li uzas lingvon en kiu du nuraj mezuroj, aŭ unu simpla agorda sinsekvo sufiĉas por certigi la subskribon. La Strauss-a originaleco malcedas al ĉiuj stilaj miksaĵoj, aludaj miksaĵoj en kiu li plaĉiĝis, kun imponegaj koketeco kaj trovemo.

Lia biografio enhavas nenian pitoreskan aŭ spek-

tindan elementon. Li naskiĝis en Munchen en 1864, filo de muzikisto de la reĝa ĉambro parenco de la fama bierfaristo Pschorr, lia onklo, kies « doppel Bock » estas tiom fortiga, kiom estas la muziko de la nevo. Li studas pri orkestra direktado, kaj samtempe daŭrigas sian intelektan kaj estetikajn formiĝon sub influo de la filozofo Alex. Ritter kaj de Wagner, kvankam liaj unuaj verkoj aŭdigas brahmsan resonadon.

Sinsekve, li estos oficiala estro en la operdomoj de Munchen, Berlin, kaj Wien, kaj kelksezone en Bayreuth. Li vojaĝos tra la mondo por direkti siajn komponaĵojn, aktiveco kiun li partigos per fruktodona restadoj en sia montara restadejo en Garmisch, kie la plej grava parto de lia laboro estas verkita, kaj kie li mortos, fama kaj gloriplena en freŝa maljuneco. Necesas aldoni, ke nenian parencecon li havas kun la reĝoj de la valso, la vienaj Strauss.

Lia verko, kiu estas konsiderinda pri la kvanto kaj pri la kvalito estas klasenda sub du rubrikoj ; instrumentaj kaj teatraj verkoj.

Sub la unua rubriko kuniĝas dek simfoniaj poemoj, verkitaĵe de 1886 al 1905. Sub la dua rubriko kuniĝas dek kvin operoj, verkitaĵe de 1905 al 1941, inter kiuj ni povas kalkuli muzikajn tragediojn, farsoperojn kaj muzikajn komediojn. Por fini katalogon jam imponan, ni citu kelkajn pliajn verkojn de ĉambromuziko, cent kvindek lidojn kaj renovigon de la fama « Traktato pri orkestrado » de Berlioz.

La kerno de tio kion li alportis al la muzika historio kuŝas unue en sia harmonia lingvo. Li daŭrigis la emancipadon de la tradicia harmonio, ne laŭ la netonaleca orientado de Wagner-Mahler - Schönberg, kiu kondukas la kromatismon al siaj plej kompletaj konsekvencoj sed kontraŭe, laŭ la « orientado, iom pli latina, de komenco de multtonaleco. Li kreas kvazaŭan agordan polifonion, kiu transfor-

miĝas al ŝajna malgravigo de la tonalecaj apogpunktoj, almenaŭ ĝis 1908, ĉar poste li revenos al pli fortika tonaleco.

La dua novaĵo, kiun la arto de Strauss alportas al ni, kuŝas en sia instrumenta genio? Unuafoje, la germana muziko renkontas tiom spertan, tiom potencon, tiom aŭdacan koloriston. Paralele al Debussy, li grandigas la orkestrajn kapablojn, kun miriga virtuozezo laŭ la prisonoraj principoj de Berlioz, kiujn li admiris. Tiuparte, kvankam, pro la tiutempa bulimio muzika, li arigas plej multajn instrumentojn kaj konstruas la plej pezajn sonorajn strukturojn, ĉio sonoradas mirinde, eĉ dum la plej kompleksaj kaj riĉaj soneksplodoj. En la afero de la lirika teatro Strauss konstruas kvazaŭan sintezon inter la kontinua deklamado de la Wagner-a stilo kaj la Mozart-a « recitativo secco », realigante tre personan, stilon de muzika konversacio, kies plasteco kaj fleksebleco estas neoftaj : li estas unu el la modernaj mastroj de la lirika deklamado.

Maldeale, lia kariero estas partigebla en du sufiĉe apartaj periodoj, kvankam ili kuŝas parte unu super la alia ; dum la unua, li montriĝas majstro de la simfonia poemo, li kondukas kiel idealisto, romantika ido, sed tamen iom skeptika idealisto, ĉiam malproksima de la metafizikaj agonioj de Mahler, aŭ de la mistikaj ekstazoj de Brückner. Tiun unuan periodon, kiu enkalkulas ĉiujn sinfoniajn poemojn, oni povas nomi « filozofia periodo » : malkontentiga traserĉo de la eterna heroo en « Don Juan » ; savo dank'al la morto en « Morto kaj Transfiguriĝo » ; malŝato de la burĝaj konvencioj en « Till Eulenspiegel » ; iom furioza superhoma idealismo en « Tiel parolis Zarathoustra » ; orgojla, poste pesimisma idealismo en « Vivo de Heroo » ; komentoj samtempe malfidemaj kaj fidemaj al la geedza vivo en « Sinfonia Domestica » ; neceso de forkuro al la naturo en « Simfonio Alpa ».

Tiel elvokinta, tamen sen troa timo, kelkajn el la dramoj de la homaj vivkondiĉoj kaj de la malheleco por vivi, Strauss poste provos ektuŝi malpli altnivelajn, pli vulgarajn problemojn, tamen ne mallogajn, t.e. la pentradon de homo kontraŭ si-mem, kaj ne plu kontraŭ senlimeco. Tion permesas al li la scenejo de la tragedio aŭ de la komedio. Nun temas pri la dua produkt-periodo, preskaŭ tute dediĉita al la teatro. Tie, li montriĝas kiel majstro de l'opero, baroka muzikisto ĉe kiu grandigita skeptikismo kuniĝas al vigla sensamo, kiel komponisto iom 18-jarcenta, t.e. artisto en malgranda germania

kortego, artisto, kies nomo tuj famiĝas en tuta Eŭropo. Tiuvicpunkte, Strauss estas versajne la sola germana muzikisto el sia generacio, kiu transsaltis la sialandajn limojn kaj tuj akiris internacian aŭdantaron.


Dum tiu teatra periodo, post du malgravaj provoj Wagner-devenaj (Guntram kaj Feuersnot), li komencas la serion de siaj veraj ĉef-verkoj, en perforta kaj kolerkria atmosfero, kaj en etoso de muzika « modernismo », kun « Salomé » (1905) kaj « Elektra » (1908) ; ili ŝokis per siaj temoj kaj lingvoj ; kaj ĉar ili estis unuaktaj, tial ili starigis malfacilaĵojn inter la teatraj direktoroj kaj la koncesiuoj de la bufedoj kaj de la bombonoj. Post la antikvaj kruelaĵoj, tute alian vojon li ekkaptas kun « Der Rosenkavalier », grandskala muzika komedio eltirita el la galanta kroniko de Vien dum la « Maria-Tereza »-a regno, vojon kiu kulminas en 1915 kun « Ariane en Naxos », ĉefverko en kiu resumigas la tuta Strauss-a arto, kie sinteziĝas ĉiuj barokaj emoj siaj, ĉar ĝi estas miksaĵo majstre lerta de « operaseria » kaj de « opera-buffa » tiaj, kiaj ili ekzistas dum la klasika epoko.

Poste sinsekvos verkoj divers-inspiritaj : « La virino senombra », magia kaj morala opero ; « Intermezzo » opero « kun jako », « burĝa komedio » kie la komponisto teatrigas momenton iom nervema de sia propra edza vivo ; « Arabella », alia muzika komedio kiu estas la similaĵo de la « Kavaliro », dank'al sia « roccoco-biedermeier »-a viena karaktero ; « La Senbrua Virino » kiu kuŝas inter la « comedia-dell'arte » kaj de la « opera-buffa » ; « Tago kun paco » historia kaj pacifista tragedio, ĉef-verko kiu estis abunde prifajfita en 1938, je la ordono de la nazioj ; « Daphne » kaj « La Amo al Danaë », specoj de pastoraloj situantaj inter la Antikvaj Tempoj kaj la 18-a jarcento ; fine « Capriccio » « teoria komedio » sub-titolita « almuzikigita konversacio », ia « Impromptu de Versailles » je la komenco de la 18-a jarcento, en kastelo en « Ile de France », kaj kie oni diskutas pri la respektivaj meritoj de la poezio, de la muziko kaj de la danco, ĉirkaŭ bela grafino.

Tia estis tiu kariero, diversa kaj produkt-plena, tiom riĉa je humanaj, metiistaj kaj artistaj instruoj, tiom inventema, tiom malavare sentigita, kaj kiu, fine, donas akompanan muzikon tiom mirindan al jaroj kiuj, ofte, estis malpli tiaj.


Claude ROSTAND (« Cahier Bicolore »).
Esperantigis : Dro J. Dumas.





Kelkaj faktoj pri Pollando

Krakovio festis la Sesan centjaran datrevenon de la unua Universitato fondita en Pollando, kie studis kaj poste instruis la fama Nikolao Copernic. Krakovio estas eble la plej alloga urbo por la turistoj en Pollando ĉar ĝi ne estis detruita de la milito. Dekoj da preĝejoj kaj kurioza mezepoka fortikajo kaj muzeoj revivigas la splendoron de riĉa kultura kaj arta pasinteco. Sur la monteto, la reĝa palaco Wawel kaj ĝia katedralo, sepultejo de la polaj reĝoj.



En la ĉirkaŭurbo konstruiĝas la morgaŭa Pollando en Nowa-Huta, naskiĝinta post la milito kaj kiu estas la plej grava ferindustrio-komplekso en la lando.

Kelkajn kilometrojn for, la turistoj neniam forgesas viziti la sal-minejojn de Wieliczka jam miljaraj. Ili konstituas kvazaŭan subteran urbon kun ĉambregoj, lagoj, kapeloj, skulptitaj en la ŝtonsaldo de ministoj kiuj pruviĝis veraj artistoj.



Ĉe la alia ekstremo de la lando troviĝas Gdansk, Sopot kaj Gdynia. Kiel la centron de Varsovio, la Poloj rekonstruis Gdansk preskaŭ tute detruita dum la milito kun ĝia pasinta splendoro. La vizitantoj povas admiri, apud la Urbodomo kaj ĝia turo la preĝejon Nia Sinjorino de la XIV-a kaj XV-a jarcentoj, la plej vastan preĝejon en Pollando ĉar ĝi povas enteni 25.000 personojn. En Oliwa, kvartalo de la urbo, en bela parko staras la abata preĝejo kiu posedas mirindajn orgenojn. Sopot estas banloko, kaj Gdynia, kvankam nur kvardekjara estas la dua haveno en Pollando.

La turistoj ĉiam kun granda plezuro vizitas la mil lagojn de Mazurio, meze de belaj arbaroj, kaj ĉie malkovras vilaĝojn riĉajn je arta pasinteco, kaj folkloron pie konservitan kiel, ekzemple la dancojn de la Tatra-montaranoj.

FANTAZIAĴO de

- *Helène Chavan* -

MEMORAĴO

(1-a parto)

Estis dum tiu somero 1963, tro freŝa, griza, malseka; en Grezijono, la feriantoj povis nur momente promeni, ĉiam kun pluv-mantelo surbrake.

Sed la unuan de aŭgusto, lia Moŝto Suno levigis jam frumatene en siaj majesto, splendoro kaj gloro. Arboj ploris kelkajn larmojn de gojo, kiuj trembrilis kiel diamantoj. Baldaŭ la suno frandis tiun donacon, ame kare-sis ĉiujn herbojn, plantojn, arbojn kaj bestojn. Mirinde dankema aspektis la tuta naturo. La foliaro brilis kiel muzea pargeto, birdoj trilis vete, kaj eĉ ŝajnis ke, dumnokte, koboldoj smirgis la gruzon antaŭ la kastelo; ĉio estis ja bela, rava, ensorĉa. La grezijonanoj estis gaje feliĉaj. Virinoj vete surmetis siajn plej helajn koketajn robojn kaj blankajn sandalojn.

— Ha! mi rekonas mian varman sunon, preskaŭ kantis Etienne, tre bruna, sveltega junulo el Madagascaro. Mi invitas vin por viziti, pere de mia duĉevala aŭto, iu ĉirkaŭaĵon. Kion vi proponas?

— Allogus min la antikva, mondkonata apoteko en Baugé, murmuris mi.

— Je 20 kilometroj, artista potisto ekspozicias en sia ĝardeno, admirindajn verkojn, tornitajn, dekoritajn el siaj manoj, aldonis Johano.

— Kial ne viziti la zoologian parkon en...

— Ne, kara Jocelyne, ĉi estas tro malproksima. Memoru: ĉiŝpere ni vizitos: « Sonoj kaj lumoj » en Le Lude, la plej bela el tiuj spektakloj en Francio.

Subite, malantaŭ ni; basvoĉo gorgé parolis:

— Mi sugestas la Dolmenon, praŝtonon, 3.000 jarojn pli aĝa ol vi. Ni kapreturte rekonis Jozé, hispano ne facile difinebla; ĉiam li ŝajnas aktori, sed tamen liaj paroloj grave impresas, kaj li ĉiam bone konkludas. Ni kvar okulsignis, mense grimacis, ĉar la invito ne celis lin. Sed, grandanime, Etienne preskaŭ tuj respondis:

— Bone, bonege, mi kontentigos vin. Je la dua akurate antaŭ la honorperono. Ni, do, veturis kvinhope en la eta Citroen. Antaŭe,

la eta Etienne kaj la normformata Johano; ĉe ilia dorso, la seke maldika José inter la rava Jocelyne kaj mi.

Etienne ĉiam haltis 30 metrojn post la insuleto por admirigi la belan, gracion, majestatan silueton de la kastelo, kaj ek... tra la riĉa Loir-kamparo ĝis la unua celo: la Dolmeno, la praŝtono.

Subite Etienne elŝaltis la motoron. Ni vidis tre mallarĝan vojeton kun du profundaj sulkoj plenplenaj de la lastaj pluvoj, de ambaŭ flankoj branĉoj kunigis en verda, malseka arkaĵo nepenetrebla al suno.

— Piediri kun viaj delikataj sandaloj estas neeble. Mia kara, fidela malnova veturilo, estu afabla kun la Esperantistoj! Veturigu nin trans tiu kotmaro!

Kun grincoj, knaroj, ĝemoj ĝi vadis, paelis, kaĉobaraktis, spruĉmakulante ambaŭ branĉobariolojn, kaj abrupte skuante nin. Tamen ni fine alvenis al la celo, sur rondforma, sunriĉa, florplena herbejo. Jen la fama praŝtono, vastege masega, mistere malhela. Tuj Jocelyne kaj Etienne sur ĝin grimpis kaj glitis laŭte ridante. José, ĝis nun, silentis, sed baldaŭ li impete tondris:

— Ho! ĉu vi ne komprenas, ke tiu ŝtono, tiu loko mem estas sanktegaj ekde tri jarmiloj, vidu tiun ekzakte rondforman herbejon, tie, feoj kaj feinoj nokte dancadis. La bestoj mem scias tion, kaj neniam forlasas tie fetorajn spurojn. Vi ambaŭ, senrespektaj gejunuloj, ridegas, krias, profanas la lokon.

Certe li aktoris, vere tiel bone, ke ni, ĉiukonsente ŝajnis kore pentigitaj antaŭ lia emfaza kolero.

Li daŭrigis:

— Sidigu sur tiun muraĉon, kiel koboldoj kaj sorĉistinoj. Ha! Dio! pardonu ilin, kaj al mi, kiu ne alparolas Vin hispanlingve, la sola inda de Vi. Jes, kamaradoj, Zamenhof scias tion, ĉar li eltiris el nia dia lingvo, multajn radikojn: ekzemple: bando, gesto, golfo, idilio, libro, mano...

— Ha! ne, ne! ĵam ĉimateni mi pense eltenis tri horojn pri gramatiko, sopiris Jocelyne, prefere rakontu ion pri la deveno de Grezijono.

(daŭrigota).

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Ni memorigas al vi, ke nur la abonantoj rajtas partopreni la konkurson. La konkursantoj sendu almenaŭ unufoje la banderolon de la revuo. La solvoj de la du subaj problemoj estu senditaj al Sro Chevalier, 19, bd Lauriol, Nantes (L.-A.), Francujo, antaŭ la fino de Marto 1965.

UNUA PROBLEMO

Bonvolu korekti la ĉisubajn frazojn, kondiĉe ke ili estu malkorektaj ! Estos kalkulitaj 2 poentoj por ĉiu eraro korektita, sed estos forprenita po 1 poento por ĉiu malĝusta korekto.

— La gepatroj de Jozefo tre ĉagreniŝ pro lia mildiligenteco.

— La kvanto da ŝanĝoj en la manuskripto estas tre granda.

— En tiu tempo oni ne vidis tiom da novajn konstruaĵojn, kiel nun.

— Boteloj plenaj da akvo estas tre pezaj.

— La estraro esperas, ke ni kune havu agrablajn, lernemajn kaj amuzajn vesperojn.

DUA PROBLEMO (20 poentoj) :

Bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj en la ĉisubaj frazoj.

— Ili estas entuziasmaj Esperanto.

— Ne ŝovu nazon fremdan vazon.

— Mi estas parenca li.

— Ĉu vi opinias min kapabla tia malnobla agado ?

— Bone estos se vi tenos vin unu afero.

— Ĝi estis juna homo de dudek tri jaroj.

— Estus dezirinde, ke ni estu amikoj ĉiuj nacioj.

— La preparoj la proksima kongreso estas en bona vojo efektiviĝo.

— Li ne povas ion fari siaj dek fingroj.

AMUZAJ PROBLEMOJ (ekster la konkurso)

Solvoj de la lastaj problemoj :

Paradokso. — Ni skribas : $4 - 10 = 9 - 15$

Ni aldonu 25 al la du nombroj :

$$\begin{array}{r} 4 \\ 4 - 10 + \frac{25}{4} = 9 - 15 + \frac{25}{4} \\ \hline \text{aŭ : } (2 - \frac{5}{2})^2 = (3 - \frac{5}{2})^2 \end{array}$$

Ekstraktinte la kvadratan radikon de ĉiu membro oni ricevas :

$$2 - \frac{5}{2} = 3 - \frac{5}{2} \quad \text{do} \quad 2 = 3$$

Eksplikoj : Estu $a^2 = b^2$.

Oni povas diskuti $a = b$ se « a » kaj « b » havas saman signon, kaj $a = -b$ se « a » kaj « b » havas kontraŭajn signojn.

$$\text{En la supra ekzemplo : } 2 - \frac{5}{2} < 0 \quad 3 - \frac{5}{2} > 0$$

$$3 - \frac{5}{2} = - (2 - \frac{5}{2}) ; \quad \frac{1}{2} = \frac{1}{2}$$

do ja ne estas $2 = 3$; memkompreneble !

NOVA PROBLEMO (S-ro Salasc)

Trovu frazon, kiu estis skribita de E. Privat pri la patrino de nio majstro Zamenhof. La frazo konsistas el 58 literoj. Tiuj literoj estas troveblaj helpe de la ĉi subaj ŝlosilvortoj.

29 — 9 — 17 — 4 — 2 — : araba tribestro.

3 — 19 — 15 — 12 — 21 — 30 — : tegi per argentebrila metalo.

11 — 20 — 27 — 6 — 7 — 5 — : sovaĝa birdo.

8 — 34 — 29 — 26 — 31 — 23 — : foliforma rokaĵo.

24 — 44 — 10 — 14 — 36 — 35 — : jugoslava mono.

18 — 16 — 38 — 49 — 45 — 33 — 42 — : bestmortigisto.

40 — 28 — 43 — 4 — 25 — 53 — 57 — : ĥina urbo.

46 — 13 — 1 — 50 — 48 — 55 — 41 — 2 — : interregna delegitaro.

54 — 7 — 22 — 52 — 47 — 19 — 23 — : Tuta paren-caro.

51 — 37 — 58 — 32 — 56 — 42 — : intesta mezparto.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« La adjektivo difinas la substantivon aŭ la pronomon havantan sencon de substantivo (responde la demandon « kia ») kaj la adverbo difinas la verbon (responde la demandon « kiel »). Tial ni diras : « la vetero estas bona », « li kantas bone ». Tamen en la okazoj, kie la difino apartenas precize nek al substantivo aŭ pronomo, nek al verbo, ni ofte ne povas decide diri, kian demandon (kia aŭ kiel) nia difino devas respondi kaj kian formon ni devas uzi... En nia lingvo ni konsilas uzadi en tiuj okazoj ĉiam la adverbos ; ekzemple : « estas varme », estas vere », « ĝi estas vera ».

L.L. Zamenhof - Lingvaj Respondoj.



Estas bedaŭrinde, ke la hundo ne estas bone edukita.




Estas vere, ke la natura felto estas pli varmiga ol la artefarita.



Estus tiel simple min rejunigi

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).
- Belujo** : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).
- Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).
- Ĉeĥoslovakio** : S-ro Dezidero Koronczi, Bana Cigel, PRIEDVIDZA.
- Finnlando** : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (4,5 mk.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).
- Germanujo (Okc.)** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).
- Hispanujo** : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).
- Italujo** : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO.
- Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBLJANA, Poŝtfako 239 (900 d.).
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberst rodez veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).
- Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).
- Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 złotoj).
- Svedujo** : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö, Postgiro : 157007 (6 kr.).
- Svislando** : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (5 sv. fr.).
- Tajlando** : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
- Usono** : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).
- Aliaj Landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (16 st.), aŭ respondkuponoj (12 respk), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo